

FEBRUARO 2016



La «Espéranto-Gironde» Informilo

N° 146

Centjariĝo de Pedro



**la 6an de februaro
en Gujan-Mestras**

ESPERANTO-GIRONDE
ĝojas honori sian plejaĝan kamaradon,
elstara esperantisto, emerita ostrobredisto,
okaze de lia centjariĝo
en Gujan-Mestras la 6an de februaro 2016

En la urbodomo de Gujan-Mestras la honorsalono tagmeze plenplenas. Familianoj el la tri generacioj (gefiloj, genepoj kaj gepranepoj) kaj geamikoj, inter kiuj dudeko da esperantistoj, ĉirkaŭas klar-vidan kaj -mensan Pedron. Ja la pezo de la aĝo igas lin nerapidi, tamen li senhelpe paŝas. Kaj li kapablas plu aplombe respondi kaj ŝerci, tuj kiam eblas! Ekzemple kiam la senatanino kaj urbestriino Marie-Hélène Des Esgaulx oficiale honoras lin kaj gratulas lin. Per mallonga parolado ŝi aludas pri lia engaĝita vivo, liaj junaĝo en Hispanio, alveno en Gujan, laboro ĉe la ostrohaveno kaj persistemo favore al esperanto. Ŝi ja konfesas, ke Pedro ĉiam obstine sekvis proprajn konvinkojn malsamajn ol ŝiajn, tamen ŝi sentigas emociion rekte parolante al lia orelo. Pedro ricevas la honoran medalon de la urbo kaj belege ilustritan libron pri la arkaŝona golfeto... lia vivelemento! Ŝi dankas al la lokaj esperantistoj pro la organizado de tiu speciala tago.



La urbestriino donacas al Pedro la honoran medalon de la urbo.

Ja esperant-lingve protokole paroladas Bernard (Vidal) kun traduko de Mireille kaj sekve Elvezio kun traduko de Ĵanseb. Ni ekscias, kiel Pedro renkontis esperanton: dum la milito li estis rekviziita por la laborejo de la submarŝipa bazo en Bordo. Sed pro tuberkulozo Pedro vizitas la hospitalon; tiam kuŝas apud li trafita rezistanto, esperantisto, kiu facile konvinkas Pedron lerni la internacian lingvon... Poste ni ankaŭ ekscios, kiel li renkontis Yvonne, kiu fariĝos lia edzino!

Pluraj emociaj larmoj fluas el la okuloj de Pedro... kaj de kelkaj aliaj ĉeestantoj!

Antaŭ ol kuntrinki la ĉeestantaro kunkantas unue en la franca la lokan *Hymne du bassin* kaj poste la esperantan *La Espero*.

Dum Pedro iras iom ripozi post tiu forta emocio, trideko da geamikoj tagmanĝas en restoracio ĉe la ostrohaveno. Agrabla amika etoso regas ĉe tabloj, kiuj mikse akceptas familianojn kaj geamikojn inter esperantistoj.

Post la manĝo Bernardo devas forveturi al cetera rendezuo sed Monique, Joël, Ĵanseb kaj Marcelo ĝuas senpluvan ĉielon dum digestiga promenado ĝis la golfeto. Kiam ili poste atingas la hejmon de Pedro, por plu festi ĉirkaŭ kremkukego kaj kromaj boteloj, proksimume dudek personoj plu ĉeeste honoras Pedron, kiu feliĉas!



Post la frandado ni kunkantas en esperanto *La tempo de l' ĉerizoj*, *Tuj la Kompanar'*, *Ni hisu la velojn* kaj fine *La dizertonto*.

Herminia, la filino de Pedro, metas inter miajn manojn albumon kaj demandas min, ĉu mi rekonas kelkajn personojn. Temas pri la zorge kolektitaj esperanto-arkivoj de Pedro kaj Yvonne. Je la unua foto mi demandas ŝin:

- Ĉu ci konas tiun junulon?

- Ne, respondas ŝi.

Tiam mia fingro montras Joël!

Fine jam vespero mallumigas la ĉielon. Ni malfacile forlasas tian belan etoson ĉirkaŭ daŭre sprita luma Pedro, kiu sentence konkludas ĉe mia orelo, kiam mi pretas kisi lin: «Ne maljuniĝu»!

Marcelo



Jubilea
Pedro



L'Espéranto, ça conserve !

6 Février 2016, 22:40

Publié par Bernardoc (Page Facebook d'Espéranto Gironde)

<https://www.facebook.com/esperanto.gironde>

Tout le monde se souvient encore de Jeanne CALMENT, morte à 120 ans après avoir appris l'espéranto. Aujourd'hui, à midi, nous étions invités à la mairie de Gujan-Mestras par le Sénateur-Maire, Marie-Hélène DES ESGAULX, pour fêter l'anniversaire d'un petit jeune. En effet, Pedro SEVILLA, ancien soldat républicain espagnol, célébrait son premier centenaire.

Le groupe espérantiste de Gujan avait bien fait les choses, et nous étions nombreux, espérantistes ou non, à entourer Pedro pour l'occasion.

La maire a fait un discours qui venait du cœur, plein d'humanité et de fraternité, alternant le « tu » et le « vous », qui a touché non seulement Pedro, mais toute l'assistance.

Puis vinrent les discours en espéranto (traduits) ; d'abord celui de Bernard VIDAL, cheville ouvrière de la cérémonie, puis celui d'Elvezio, court mais plein d'humour (c'est lui qui a parlé du premier centenaire de Pedro).

C'est alors que la maire a offert un bel album photographique du Bassin à Pedro (qu'elle a tout le temps appelé « Pierre ») et la médaille de citoyen d'honneur de la ville.

Enfin, avant le vin d'honneur, tout le monde a chanté *La chanson du Bassin* (sur l'air de *La Madelon*) et les espérantistes ont chanté leur hymne, écrit par Zamenhof : *La Espero*.

Un repas suivait au restaurant du canal pour ceux qui le souhaitaient, avant le gâteau d'anniversaire chez Pedro.



Ĉiuj kantas honore al Pedro.

Vortoj de Elvezio al Pedro

Kara Pedro,

Nome de nia asocio Espéranto-Gironde mi deziras al vi tute kore feličan unuan centjaron!

Ni ĉiuj tre ĝojas festi hodiaŭ eble la plej maljunan esperantiston el Francio! Via vivo estas kiel longa vojaĝo: el Hispanio al Francio, tra la tuta mondo, ĝis Esperantujo! Vi estas, kara Pedro, la viva pruvo ke lerni esperanton estas tre sana aktiveco! La kuracistoj devus konsili ĝin al ĉiuj homoj!

Mi ne scias, ĉu vi jam trovis perlon en viaj ostroj; sed mi estas certa ke ni ĉiuj vere trovis nian perlon: estas vi! Gratulon!



Bernard kaj Elvezio honoras Pedron.

Pedro ricevas belegan libron pri Arkaŝona Golfeto.



Pedro kun ĝojaj filino, nepino kaj pranepino.



La vie espérantiste (discours de Bernard Vidal)

Le 29 janvier 1916, une étoile verte traverse le ciel de La Roda quand le nouveau-né Pedro pousse son premier cri.

Mais c'est lors de son séjour à l'Hôpital Haut-Lévêque à Bordeaux, qu'un maquisard français, André Gay, lui propose de lui apprendre l'espéranto.

Quand il a vu et lu le livre *Nouveau Cours rationnel d'Espéranto* cela l'a enthousiasmé.

Pendant trois mois, il apprend l'espéranto, ensuite il a pu enfin écrire à sa famille et leur transmette une lettre par le biais d'un espérantiste anglais.

En 1946, il rencontre un autre espérantiste français, Roland Levraud, avec qui une forte amitié se nouera.

Grâce à lui, il découvre les revues espérantistes et dispose de nombreuses adresses dans le monde entier.

En 1959, après un examen, il reçut son premier diplôme, ensuite, lors de Congrès, il passa deux autres examens d'espéranto, et en obtint les diplômes.

Il eut des correspondants amis de nombreux pays d'Europe mais aussi de Chine, du Japon, d'Amérique du Sud, d'Israël, d'Iran, de Cuba, etc.

Avec son épouse, il a accueilli chez eux de nombreux voyageurs et correspondants espérantistes, ainsi que l'espérantiste anglais qui lui avait permis de contacter sa famille ; le dernier était Miguel, un Cubain.

- 1975, Pedro adhère à l'association mondiale d'espéranto.

- 1989, il devient délégué local de cette association, son nom apparaît dans l'annuaire. Depuis, on peut le contacter depuis le monde entier.

Il participa à de nombreux congrès nationaux en Espagne, ainsi qu'à des congrès internationaux : Espagne, Portugal, Cuba, Norvège, Islande, Allemagne, Bulgarie..., ailleurs certainement.

Il est devenu collectionneur de timbres, et sur la table de son stand lors de la Foire aux huîtres à Gujan, on pouvait voir des timbres et des lettres de nombreux pays.



La vie sociale (discours de Bernard Vidal)

Né le 29 janvier 1916 à La Roda en Espagne, dans la Province de la Mancha, pays de Don Quichotte.

- Aîné de huit enfants.

- Soldat républicain contre les troupes franquistes lors de la guerre civile d'Espagne, au début de l'année 1939 il se voit contraint de quitter son pays pour la France.

- Entrant en France au titre de réfugié, il est désarmé, puis est interné dans le camp de concentration de Prats-de-Mollo (dans les Pyrénées Orientales).

- En 1941, il est transféré dans un camp de concentration près de Bordeaux, puis est réquisitionné par les nazis, et fait partie des 6000 ouvriers qui participèrent à la construction de la base sous-marine.

- En 1944 : C'est lors de cette vie très dure qu'il est admis à l'hôpital Haut-Levêque, où il a failli être amputé d'une jambe après avoir attrapé la tuberculose. Il se fait soigner jusqu'en 1946.

- C'est pendant cette hospitalisation qu'il va connaître et apprendre l'espéranto.

- Lors de son séjour à l'hôpital, une jeune institutrice de Gujan-Mestras Yvonne DOUSSE se rend chaque semaine à l'hôpital Haut-Lévêque en tant que bénévole pour donner des cours de français aux malades.



- En 1946 il épouse Yvonne, et vient habiter Gujan-Mestras.

- Il découvre le métier d'ostréiculteur, prend une concession au port de Gujan puis il développe sa petite entreprise avec courage et énergie au port de la Hume.

- Tous les week-ends, il partait vendre sa production à Bordeaux et dans le secteur de Pomerol.

- Deux enfants suivront bientôt cette union : Jean-Pierre et Herminia.

- La famille s'est agrandie maintenant à deux petites-filles et cinq arrière-petits-enfants.

- En 1976, il y a quarante ans, il présente son projet d'une association au maire M. Michel Bezian.

- En 1977, la première convention avec l'aide d'Espéranto-Gironde a lieu et est présidée par le maire Michel Bezian.

- L'association des Espérantistes de Gujan-Mestras naît officiellement en 1979.

- Pendant trois ans, de 1980 à 1983, deux fois par semaine il initie des collégiens de Chante-Cigale à l'espéranto.

- Chaque année, à la Foire aux huîtres, il tient avec son épouse un stand d'information sur l'espéranto, toujours fidèle à sa passion pour la propagation de l'espéranto.

- Le 18 mai 1981, inauguration de la Maison culturelle de Gujan Zamenhof.

- Avril 2004, son épouse Yvonne décède.

- Lors de l'inauguration de la Maison des associations, le 1^{er} mars 2011, il se voit remettre la médaille des associations.



Arkaŝona Golfeto



La urbestrino komplezeme alparolas Pedron.



Bernard Vidal, kunorganizanto de la jubilea festo.



Brilokula centjarulo!

Le président a 100 ans

Sympathique et émouvante réception, samedi, dans les salons de l'hôtel de ville où Marie-Hélène des Es-gaulx, sénateur maire, et son Conseil municipal recevaient Pedro Sevilla. « C'est une figure de Gujan-Mestras que nous honorons aujourd'hui à l'occasion de ses 100 ans. Nous pouvons nous enorgueillir d'avoir un président d'association centenaire. » Espérantiste convaincu, Pedro n'a eu de cesse de mettre en avant la « langue universelle ». Celle qui lui a permis de s'intégrer totalement dans la cité Barbot, sa ville d'adoption.

Aîné d'une famille de huit enfants, il est né le 29 janvier 1916 à La Roda en Espagne. Soldat républicain, il s'est battu contre les troupes franquistes lors de la guerre civile espagnole. Contraint de quitter son pays natal en 1939, il se réfugie en France. Il est interné dans le camp de Prats de Mollo dans les Pyrénées orientales avant d'être transféré près de Bordeaux en 1941. Réquisitionné par les Nazis, il fait partie des 6 000 ouvriers qui participent à la construction de la base sous marine. Tombé malade en 1944, il est hospitalisé à Haut-Lévêque.

Découverte de l'espéranto

C'est là qu'un malade étranger lui fait découvrir et apprendre l'espéranto, cette langue internationale parlée dans 120 pays. C'est aussi là qu'il fait la connaissance d'Yvonne Doussé. Jeune institutrice gujanaise, elle se rend bénévolement chaque



Pour ses 100 ans, Pierre Sevilla était l'hôte de la ville qui a rendu hommage à son action. PHOTO FLORENCE LEGRAND

semaine à l'hôpital pour donner des cours de français aux malades. Ils se marient en 1946. Pedro vient habiter à Gujan-Mestras, il découvre le métier d'ostréiculteur et crée sa petite entreprise au port de la Hume. Mais il continue d'apprendre et de perfectionner son espéranto.

C'est en 1976 qu'il propose à Michel Bézian, maire, son projet d'enseigner la langue du docteur Zamenhof au sein d'une association. Avec l'aide d'Espéranto Gironde, l'association des Espérantistes de Gujan-Mestras voit officiellement le jour en 1979. Pendant trois ans (1980-1983) Pedro initie, deux fois par semaine, des collégiens de Chante-Cigale dans le cadre des ac-

tivités socioculturelles. Toujours fidèle à la langue qui lui a permis de s'intégrer, il n'a de cesse de mettre en avant l'espéranto. Récompense suprême qui fait la fierté de Pedro, l'inauguration du centre culturel Zamenhof, rue Jules-Barat. En récompense de sa pugnacité et de son engagement sans faille, le 1^{er} mars 2011, Pierre Sevilla reçoit la médaille des associations.

Aujourd'hui encore, Pedro continue de vivre sa passion et de la partager avec les adhérents de son association. Après un siècle de vie trépidante, Marie-Hélène des Es-gaulx a tenu à honorer ce citoyen gujanais en lui remettant la médaille de la ville.

Jacky Donzeaud

ĜENERALA ASEMBLEO DE ESPERANTO-GIRONDE

DIMANĈON LA 29an de NOVEMBRO 2015

EN CENON PALMER je la 10a 30

Ĉeestis: Jean-Séb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty, Martine Edelbloude, Bruno Ferré, Christiane Jagueneau, Michel Jagueneau, Peyo Labbé, Joël Lajus, Claudine Pomirrol, Marcelo Redoulez, Bernardo Sarlandie, Morine Stride, Bernard Vidal.

Senkulpigita: Gloria Gargallo

1/ Agad-raporto (fare de la sekretariino)

De post la ĝenerala asembleo de septembro 2014, la ĉefaj agadoj de Esperanto-Gironde rilatis al La Kompanoj kaj la tiel nomata «Lilla Projekto».

• Okazis 4 kunvenoj

- La 23an de Novembro 2014, en Cenon Palmer, ni parolis pri la projekto de KD de Morine kaj Isabelle. Alia temo estis la retejoj de Esperanto-Gironde kaj de La Kompanoj. Ĉi lasta estis jam realigita komence de 2015. Kompreneble, grava temo estis la surstrata kunkantado kaj la spektaklo de la UK en Lillo.

- La 14an de Decembro 2014, okazis kunveno por la Zamenhof-tago, en la hejmo de Morine. Tiam ni plupreparis la spektaklon.

En *Le Courrier de Gironde* de la 12a de decembro estis publikigita artikolo kun intervjuo de Bernardo pri Esperanto kaj la asocio Esperanto-Gironde.

- La 12an de Januaro 2015, ni festis la reĝojn. Dum tiu kunveno, daŭre temis pri la preparo de la Lillaj spektakloj. Cetere Elvezio informis pri sia deziro estigi kurson de Esperanto en la universitato de Bordojo. En oktobro, li kun Jean-Seb kaj Bernardo okazigis prezentadon de Esperanto en la universitato, en kiu ĉeestis dekkvino da studentoj. Pluraj sin montris interesataj.

- Ni denove renkontiĝis la 15an de Februaro. Daŭre temis pri la spektakloj kaj pri la KD de Morine kaj Isabelle.

• Aliaj okazaĵoj

- En la 19a de Oktobro pluraj anoj de Esperanto-Gironde vizitis René Damarin en la domo de la asocio Paradizo Tuj, kiun li kreis en Léognan en 1969.

- En Aprilo-Majo la KD estis registrata en la studio de Jean-Paul Nogues, en Cambes, kaj ĝi estis preta por la Lilla UK.

- En Junio, la Fejsbuka paĝo de Esperanto-Gironde atingis pli ol 100 ŝatantoj kaj 137 fine de novembro. <<https://www.facebook.com/esperanto.gironde>>
- Kelkaj el ni daŭre laboris pri la Turisma Gvidlibro. Slipoj estis eldonitaj en la formato elektita, ekzemple tiuj pri la Marĉoj de Montferrand aŭ pri Montendre. Ĉar la retejo de Esperanto-Gironde ne ankoraŭ ekzistas, tiuj slipoj ne estas publikigitaj.
- Bernardo, ekde Junio, zorgis pri la organizo de prezentado de Esperanto en la Laborborso, kunlabore kun la departementa sekcio de CGT. Tiu prezentado, pere de la filmo *Esperanto* de Dominique Gautier, okazos la 15an de Decembro.
- Pluraj membroj partoprenis en Septembro en asociaj forumoj de siaj loĝurboj (Gujan-Mestras, Gradignan, Montendre...).

• La Lillaj spektakloj

- Por la preparo de la Lillaj spektakloj, okazis pluraj staĝoj dum la jaro, tra Francio. Esperanto-Gironde zorgis pri du el ili: la 11an-12an de oktobro kaj 11an-12an de julio, ambaŭ en Artigues.
- Cetere Marcelo kaj aliaj anoj de Esperanto-Gironde partoprenis en aliaj el la kantostaĝoj.
- Kompreneble la ĉefa evento estas la partopreno de La Kompanoj en la Lilla UK, unue okaze de la Nacia Vespero de dimanĉo la 26a de julio, dum kiu estis prezentata duhora spektaklo nomata *Granda Ĵak inter la Gigantoj*. Tiu spektaklo ricevis tre multajn varmegajn laŭdojn. La dua evento okazis lundon, la 27an: la surstrata kunkantado, en kiu partoprenis ducento da homoj, esperantistoj aŭ ne. Denove La Kompanoj partoprenis en surstrata kunkantado vendredon la 31an, kun Kajto.

• LEGI

Dum tiu jaro, la membroj de Esperanto-Gironde ricevis 4 numerojn de LEGI, inter kiuj LEGI 144, speciala numero, raportis 40paĝe pri la Lilla spertaĵo de La Kompanoj.

Demando pri Paradizo Tuj:

Jean-Seb kaj Joël klarigas, ke la asocio daŭre ekzistas sed ne plu aktivas. René Damarin daŭre estas aktiva. Li estas «radika» ekologiisto, aŭtodidakto, tre kulturita, nun 89jara. La asocio estis kreita en 1969 por kunigi homojn ĉirkaŭ Esperanto kaj vegetaraj manĝaĵoj. Oni ne scias, kio okazos pri la domo.

Bernardo informas, ke forpasis du membroj de Esperanto-Gironde, unu en 2015: Bernard Moynet, tre lerta per siaj manoj, kaj unu en 2014: Gaston Hérard.

La raporto estas unuanime aprobita.

2/ Financa bilanco (fare de la kasistino)

Monique klarigas kelkajn nombrojn.

En 2015 estis 31 aliĝintoj (30 en 2014).

Demando pri la financa bilanco:

Post diskuto, estas decidite, ke la financon raporton, tian, kia ĝi estis hodiaŭ prezentita, Monique sendos al la eventualaj petontoj (inkluzive ekzemple de Kompanoj, kiuj ne estas membroj de Esperanto-Gironde kaj partoprenis en la Lilla projekto).

La bilanco montras sane zorgitajn financojn de la asocio.

La raporto estas unuanime aprobata.

3/ Raporto pri la UK (fare de la partoprenintoj)

Bernard Vidal vendis dudek kvin ludojn al francoj. Li donacis plurajn al eksterlandanoj. Li ne povis ĉeesti multajn prelegojn sed havis la okazon paroli kun eksterlandanoj. Li multe ŝatis la kongreson.

Joël: Estis agrabla ferisemajno. Li renkontis konatojn. Por la Nacia Vespero, li estis en salono kun ekrano kaj trovis la spektaklon tre agrabla. Li akompanis ekskurson al Bulonjo-ĉe-Mar. Tiu ekskurso furoris, kun 300 partoprenantoj.

La urbestro Sro Cuwilliers akceptis la partoprenantojn surloke. Li multe favoras al Esperanto kaj eĉ partoprenis en la inaŭguro. Ni inaŭguris statuon de Zamenhof sur la placo de la malnova stacidomo. Poste ni iris tra la stratoj kun flagoj ĝis la urbodomo, klarigante kio okazas al la preterpasantoj. Estis akcepto en la urbodomo. Ni vizitis la teatron, kie Zamenhof prelegis. La teatro ne estis detruita dum la milito. La prelegon de Zamenhof legis Brian Moon. Post la manĝo eblis viziti la malnovan urbon; kelkaj vizitis la Nauzika-Centron.

La urbestro planas estigi Esperanto-centron en sia urbo. Bedaŭrinde neniu el la urbestro de Lillo ĉeestis en la inaŭguro.

Janine kaj Yannick rimarkis, ke la kongreso estis larĝe malfermita al la ekstera publiko, kun koncertoj, kursoj, grandaj aŭdiokasoj. La organizantoj tre bone uzis la reton (retsendo de la inaŭguro, rekte videbla ĉie ajn en la mondo). La nombro da partoprenintoj estas iom pli malgranda ol en Montpellier.

Elvezio unuafoje partoprenis en UK. Li tre ŝatis la spektaklojn de la Kompanoj. Tio estas tre entuziasmiga spertaĵo. Li ĉeestis koncertojn, prelegojn, teatraĵojn. Li renkontis multajn eksterlandanojn, interalie izraelanon, kiu instruas la jidan lingvon kaj literaturon, kaj korespondas kun li. Li ekskursis al Belgio. Li sukcese trapasis la B1-ekzamenon.

Cetere, li komencis kun Jean-Seb la Esperanto-kursojn en Universitato Bordeaux Montaigne kun 5 studentoj. Ili uzas la *Metodon 11*. La kursoj okazas merkrede de la 17a 30 ĝis la 19a, en salono B111. Ne temas pri oficiala kurso, sed pri eksperimento. Tamen li povos peti, ke Esperanto estu rigardata kiel la aliaj dudek unu lingvoj. Espereble venontjare estos 10 partoprenantoj.

Jean-Seb demandas pri uzeblaj libroj aŭ metodoj.

Bruno konsilas la 10 lecionojn, sur la reto de JEFO.

Janine: *Gerda malaperis* estas senpage retalirebla kun ekzercoj.

Yannick uzis la metodon *Mazi* kun mezlernejoj.

4/ Projektoj

Bernard V. informas, ke Pedro, la prezidanto de la grupo de Gujan Mestras, estos 100jara la 29an de januaro 2016. Okazos ĉiutage festo en Gujan la 6an de februaro. La aperitivo estos donacita far la urbestro en urbodoma salono.

Estos organizata manĝo en restoracio (ĉiu pagos sian manĝon), kun kuko kun kandeloj. Poste la festo pludaŭros ĉe Pedro. Anoj de Espéranto-Gironde estas invitataj. Necesas rapide scii pri la nombro da partoprenantoj.

Morine pretigas blogon kun paĝo en Esperanto.

Marcelo petas de Janine kaj Yannick, ĉu interesus ilian teatrotrupon partopreni en spektaklo-vespero en Cambes por kompletigi la prezentadon de *Gros Chagrins* far KVAK-trupo la 8an de oktobro 2016.

Claudine renkontis malfacilaĵojn por enpaĝigi la dudek pretajn slipojn de la TGL per Publisher. Do ŝi ne plu laboras pri la TGL de pluraj monatoj.

Marcelo: Nils (lia filo) havos iom da tempo por zorgi pri la estigo de la retejo de Espéranto-Gironde. Li ne laboras per SPIP. Ĉiel, oni devas scii, kion oni metu en la retejon: TGL-slipojn, skanitan arkivon... kion alian?

Necesas, ke estiĝu grupo, kiu zorgu pri la projekto. Cetere oni devas modernigi la logotipon.

Kotizoj: Estas decidite, ke ili ne ŝanĝiĝos por 2016:

- 17€ por unuopo
- 23€ por paro
- 35€ por aliĝo al SAT-Amikaro

5/ Diversaj demandoj

Ne estas alia demando.

6/ Renovigo de la estraro

Bernardo ne rekandidatas por la posteno de prezidanto. **Monique** bonvolas rekandidati por la posteno de kasisto, same **Janine** kaj **Morine** por la postenoj de sekretario kaj help-sekretario.

Elvezio kandidatas por la posteno de prezidanto.

Ĉiuj estas unuanime elektitaj.

Estraro de Espéranto-Gironde:

Prezidanto: Elvezio Canonica

Kasistino: Monique Dussenty

Sekretariino: Janine Dumoulin

Help-sekretariino: Morine Stride

La kunveno estas fermita je la 13a10.



NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le jeudi de 15h à 17h, cours pour débutants, au-dessus du centre St Exupéry, face à la gare SNCF. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le jeudi tous les 15 jours de 14h à 16h, cours pour débutants chez Morine STRIDE, 17 rue Voltaire. (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun mardon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ gvidas traduko-grupon kaj Claudine POMIROL kurson por komencantoj. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine Dumoulin gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono B111, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio kaj Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

LA LABOR-BORSO DE BORDOZO

La 15an de decembro, okaze de la Zamenhof-tago, Bernardo Sarlandie invitis ĉiujn interesatojn viziti la Laborborson, antaŭ la projekciado de la filmo *Esperanto*, de Dominique Gautier, en salono de tiu loko. La vizito celis ĉefe esperantistojn, kaj la filmo celis pli precize sindikatistojn de CGT, kies sidejo estas la Laborborso.



La Laborborso: fasado al korso Aristide Briand.

1. Historio

La Laborborso estas belega konstruaĵo el la epoko de «Dekor-Artoj». Ĝi estas impona je ĉiuj flankoj, ĉu historia, ĉu arkitektura, ĉu socia, ĉu politika.

Ĝi estis konstruita sur la loko de iama akvujo de Sainte-Eulalie, korso Aristide Briand, apud la placo de la Victoire. La konstruaĵo estas dividita en du partoj: unue la «Domo de la kongresoj», kies celo estas akcepti publikajn aranĝojn, kaj due la «Domo de la sindikatoj», en kiu troviĝas la sidejo de la sindikato CGT, al kiu ĝi de ĉiam estis atribuita. Tiu loko celis ebligi al laboristoj, kiel civitanoj, aliri kulturon, sed ankaŭ doni al ili rimedojn por sin defendi.

Adrien Marquet, urbestro de BordoZO inter 1925 kaj 1944, iniciatis la konstruadon de tiu granda domo sindikata, kiu estis inaŭgurita la 1an de majo 1938. Dum la milito, ĝi estis rekviziita de la germanoj. Post la milito, la Laborborso iĝis grava loko por la sindikata historio. Ĝia spektaklo-salono enhavis pli ol 1200 sidlokojn, kaj tiel estis la plej vasta en BordoZO. En ĝi spektblis same teatro, kiel kino.

Sed dum la jaroj 1970aj, la konstruaĵo ekmontris signojn de malfortikeco. La ferbetono de la jaroj 1930aj estas pora kaj akvo iom post iom trarsorbigeblas en la strukturon. En 1992 defalĵoj de ŝtonoj en la kongresa salono de la kvara etaĝo necesigis evakuadon de tiu nivelo. Sekve antaŭkonstruitaĵoj estis instalitaj en la spektaklo-salono Ambroise Croizat kaj en la enirhalo. Per petskriboj, manifestacioj, kaj poste per la kreado de subtenkomitato, la okupantoj bataladis, por ke la konstruaĵo estu restaŭrata. Ĝi enlistigis en la Historiajn Monumentojn en 1998, kio ebligis almenaŭ eviti ĝian detruon.



Super la enirejo de la salono Ambroise Croizat.

En la komenco de la jaroj 2000aj, la konstruaĵo finfine estis izolita kontraŭ pluvo kaj ekstere protektita por malebli defalĵon de beton-pecoj sur la straton.

La restaŭrado de la kvara nivelo estis realigita en 2008, tiu de la tria en 2009. Antaŭ nelonge, la ĉefa fasado kaj ties impona bareliefo estis renovigitaj, same kiel la atrio, el kiu oni havas belegan vidon al okcidento.



Sed la laboro ne ankoraŭ estas finita. Kaj ĝi verŝajne daŭros longe. La spektaklo-salono estos uzebla de la loĝantoj de la kvartalo, asocioj, universitataj esploristoj post renovigo kaj normigo.

2. Vizito

La fasado al korso Aristide Briand havas kvin vitrajn pordojn ornamitajn per feraj skribaĵoj, kiuj listigas la diversajn metiistojn, kiuj intervenis en la konstruado. Ĝin ornamas bareliefo de Alfred Janniot (kiu realigis ankaŭ tiujn de la Palaco de la Porte Dorée en Parizo).

La enirhalo estas vasta kaj de tie oni povas aliri la unuan etaĝon per impona duobla ŝtuparo. La balustradoj kaj lustroj el kupro kaj la vitro-globoj bildigas la «modernan teknikon» de la tiama epoko (materioj de la elektraj izoliloj kaj konduktiloj).



Detalo de la balustrado.



Fresko « Le Vin » de François-Maurice Roganeau en la suda fojero.

Je la unua etaĝo estas du fojeroj, po unu je ĉiu flanko de la salono Ambroise Croizat. Ĉiun ornamas freskoj de bordozaj artistoj, Camille de Buzon kaj Jean-André Caverne por la norda fojero; François-Maurice Roganeau kaj Pierre-Albert Bégau por la suda fojero.

La salonon Ambroise Croizat ornamas du freskoj de Jean Dupas, unu, kiu montras alegorion de Bordoza, kaj alia, kiu listigas francajn famulojn el sciencoj kaj artoj. Tiu salono, meblita per lignaj seĝoj, enhavis 1300 sidlokojn (900 sur la partero, kaj 400 sur la balkono).

La peristilon ornamas skulptitaj medalionoj, kiuj elvokas la historion de socialismo, tra la nomoj de Proudhon, Jaurès kaj Fourier.

3. La filmo

Post la vizito, gvidata de Bernardo, ni kuniĝis en salono por spekti la filmon *Esperanto*. Bedaŭrinde, la publiko estis malmulta, kaj ĉefe el la grupo *Espéranto-Gironde*. Tamen kelkaj ĉeestantaj sindikatistoj montriĝis tre interesataj. Eble ili iam pli profunde interesiĝos pri la lingvo!

Plej koran dankon al Bernardo pro tiu tre interesa posttagmezo!

Janine

LA FELIĈO (el la blogo de Morine)

Tiu vorto kuras sur ĉiuj lipoj en la mondo kaj en ĉiuj socioj. Ĉiuj homoj aspiras ĝin kaj provas ĉiel ajn obteni ĝin. La feliĉo estas sentempa kaj, kiel tiel bele priskribas ĝin Rimbaud, feliĉon oni vivas en eterneco. Laŭ la vortaro «Petit Robert» feliĉo estas stato de la konscienco plene kontentigita. Tio signifas, ke ekzistas konscienco de la feliĉo: ke kiu estas feliĉa, tiu vivas plensate.

Komence, por identigi ĝin, gravas difini tion, kio kapablas plensatigi nin en la vivo. Tio postulas bonan memkonon. Fakte tio, kio valoras por iu homo, ne nepre valoras por alia. Tiu, kiu plezuras praktikante sporton, ne aŭtomate havas saman senton ol tiu, kiu ŝatas praktiki belarton. Ambaŭkaze temas pri plezuro, kiu kontribuas al propra feliĉo. Jen ekzemple mi ĵus senŝeligis la unuan sezonan klementinon. Laodoro, kiun ĝi eligas, agrable rememorigas al mi miajn infanaĝajn kristnaskojn. Tiu parfumo, kiu plenigas min per bela emocio, kontribuas al mia feliĉo. Ĝuste kiam mi tion rakontas al vi, mi ankoraŭ sentas kontenton.



Cetere ĉiutage multaj aferoj povas gajigi nian vivon; ekzemple rigardi ĝardenon flori, observi paruojn trinki ĉe fontano, sensi sunradiojn sur la haŭto. Kaj matene, se mi malfermas la okulojn rigardante la tagon ne kiel tedaĵon sed kiel esploradon plenan je novaj spertoj, mia bildo de la vivo kaj de la mondo estos interese. Miaj agadoj estos fruktodonaj kaj profitigaj.

Krome, kredi, ke fortaj sensaĵoj estas la nuraj rimedoj por atingi feliĉon, estas sence. Ja, troa rapido, drogo, perforto, alkoholo kontentigas tiujn, kiuj strebas al tujaj ekcitedoj sed ili estas nocaj. Male, nasko, enloĝiĝo en nova hejmo, kreado de propra entrepreno... boligas pro ĝojo. Pri amo, la imagita ekstazo iel ebrigas. Tio produktas sanigan ekciton. Ja, tiuj emocioj estas nedaŭraj, efemeraj, sed ili estas necesaj, ĉar ili fariĝas motoro por progresi en la vivo. Tiel ni povas diri, ke ili kontribuas al nia feliĉo.

La strebado al feliĉo ligiĝas kun tiu al nia idealo. Tiel konsciante niajn valorojn, bezonojn kaj poveblecojn, ni kongruos kun ni mem. Penante por persona plenumo, ni trovos la veran signifon de nia vivo. Ekzemple, se vi ŝatas senti vin utila, vi povas radii uzante viajn talentojn favore al viaj proksimuloj. Se kuirarto logas vin, vi povas gastigi viajn infanojn, familianojn, amikojn kaj kunvivi kun ili mirindan tempon dum manĝo ame preparita. De kiam vi trovis tion, kio gajigos vin, restos al vi nur frandi tiujn momentojn kiel eble plej ofte. Tiel, vi donos sencon al via vivo.



Videble, feliĉo apartenas propre al ĉiu. Ni povas senti ĝin kaj ni maniere ĝui ĝin. Estas ankaŭ sinteno fronte al vivo, kiu indas ĉiumomentan, apartan prizorgadon. Bonhumore kaj pozitive kultivate, nia bonfarto iom post iom konscie enradikiĝos kaj flirtos kun eterneco. Ĝi helpas nin travivi afliktojn. Ja, pri tio Rimbaud pravas.

Morine STRIDE -

Decembro 2015

<http://www.morine-stride.com/blog/>

(Traduko far la cenona grupo de Espéranto-Gironde)



Jen feliĉo, multkolora!

Grava atentigo!

La venonta kunveno de Espéranto-Gironde okazos la **20an de marto**, en Montendre (Kulturcentro) ekde la 10a30.



STAĜOJ



Aprilo 08a-16a: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj en 3 niveloj

Aprilo 15a-16a: PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)

Aprilo 20a-24a: Korusa renkonto de *Interkant'*. Verkad-ateliero

Junio 12a-17a: La Luaro laŭ la vortoj, verkistoj kaj kasteloj

M.C.E. Château de Grésillon, St. Martin d'Arcé 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU

Tel.: 02 41 89 10 34 (aŭ 09 51 64 10 34) - Informoj: gresillon.org



Aprilo 11a-16a: Staĝo pri tradukado (Brian Moon)

La kurso taŭgos ankaŭ por prepariĝi al la **Atesto pri Supera Lernado** de FEI.

Aprilo 17a: Ĝenerala asembleo de SYM je la 10a

Junio 20a-24a: Promeni tra naturo kaj Vikipedio (Alain Favre)

KVINPETALO Esperanto-Centro, 4 rue du Bureau 86410 BOURESSE

Tel.: 05 49 03 43 14 (aŭ 06 07 31 67 81) - Informoj: kvinpetalo.org





Kiel Bertono Le Maire estis trompita de Renardo, kaj kiel Renardo estis trompita de Nigreto.

Kaj por ekplenumi la verdikton, Bertono levas la piedon, kiun li metas sur la gorĝon de la kaptito. Renardo prenas sian tempon, li ekkaptas la kalkanon, kunpremas la dentojn kaj la akutaj krioj de Bertono servas al li kiel unua venĝo. La doloro de la mordo estis eĉ sufiĉe forta por svenigi la nenobelon, sed rekonsciĝinte li baraktas por sin liberigi; li levas la pugnoj, batas la dorson, la orelojn kaj la kolon de Renardo, kiu sin defendas kiel li povas, sen pro tio malkunpremi la dentojn. Li faras pli, per lerta movo li haltigas la pasantan dekstran manon de Bertono, kiun li kunigas kun la jam konkerita kalkano. Kompatinda Bertono, kion vi aŭdacis fari kontraŭ Renardo? Kial vi ne lasis al li kokon, kaponojn kaj kokinojn? Ĉu ne sufiĉis kapti lin per reto? «Tiel gratas kaprino, ke ĝi miskusas»; tio estas saĝa proverbo, kiun vi devus pli frue memori.

Tiel superfortanta kalkanon kaj manon, Renardo ŝanĝas sian sintenon, kaj prenante venkan mienon: «Per la fido, kiun mi donis al mia amatino, vi estos baldaŭ mortonta, nenobelo. Ne esperu elaĉeti vin, mi ne akceptos eĉ la trezoron de la imperiestro; vi estas nun pli firme tenita ol Karolo la Granda estis en Lancono».

Tiam nenio kompareblas kun la teruro, kun la despero de la nenobelo. Okuloj larmas, koro suspiras, li kripetas indulgon per plej kompatvoka tono. «Aĥ! indulgon, Moŝto Renardo, indulgon je nomo de Dio! Ordonu, diru kion vi atendas de mi, mi obeos; ĉu vi volas akcepti min kiel vian vasalon, dum la resto de mia vivo? Ĉu vi volas ...

- Ne, nenobelo, nenion mi volas; antaŭmomente vi torente insultis min, vi ĵuris ne kompati min; nun estas mia vico; per Sankta Paolo! vin trafos verdikto, malica latrono: mi vin tenas kaj gardas. Mi atestigas Sanktan Julianon, kiu punos vin pro via malbona gastigo.

- Moŝto Renardo, singultante pludiras la nenobelo, estu mizerikorda al mi. Ne traktu min per via plej malica ago. Mi scias, mi mistrafis kontraŭ vi, pri tio mi humile kulpigas min. Decidu pri monpuno kaj mi elpagos ĝin. Akceptu min kiel vian vasalon, kiel vian servutulon; prenu mian edzinon, kaj ĉion, kion mi posedas. Ĉu tia aranĝo ne valoras? En mia hejmo vi trovos ĉion laŭdezire, ĉio estas via; mi neniam posedos enspezon, el kiu vi ne ricevos la dekonon; ĉu estas nenio havi servutulon, kiu povas disponi tiom da aferoj?


Nun necesas diri, laŭde al Mastro Renardo, ke kiam li aŭdis la nenobelon petegi kaj plori, ĉar tiu volis defendi sian kokon, li sentas sin kortuŝita per milda kompato.

- Nu, nenobelo, diras li, mutu, ne ploru, ĉifoje mi povas pardoni vin; sed neniam ree samagu, ĉar mi revidu nek mian edzinon nek miajn gefilojn se vi forsavos vin el mia verdikto. Antaŭ ol detiri vian manon kaj vian piedon, vi promesu neniam fari ion ajn kontraŭ mi. Kaj tuj post la ellaso vi omaĝos al mi kaj fordonos ĉion, kion vi posedas.

- Mi plenkore konsentas, diras la nenobelo, kaj la Sankta Spirito garantiu ke mi estu lojala ĉiuokaze.

Bertono sincere parolis ĉar, reale, kvankam avara li estas prudenta; oni povis fidi lin kiel pastron.

(Daŭrigota)



Desegnis Morin'



ESTRARO
de
« ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale:
347771 F Bordeaux



* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Rés. Du Prince Noir Bât.D Appt.315
Avenue Sainte-Marie
33400 TALENCE
Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Help-sekretariino: **Morine STRIDE**

Kasistino: **Monique DUSENTY**
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel: 05 56 06 74 49 / monique.duss@free.fr

* * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al Yannick DUMOULIN: yannickdum@free.fr

